***************************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2021/01 (majo 2021)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

***************************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj!

**Invito:** La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al nova, **reta kunveno**, okazonta virtuale inter **17-17:45 en dimanĉo, la 23an de majo 2021 en Zoom retĉambro dum la virtuala GEK.** Ne estas kostoj**,** sed bv. **aliĝi ĉe GEA** (esperanto.de) por ricevi la alireblon.
Vi povas uzi ankaŭ la rektan ligilon: https://www.esperanto.de/eo/enhavo/ali%C4%9Doanmeldung-germana-pola-esperanto-kongreso-2021. Bonvenon al tiu mallonga, sed interesa renkontiĝo, kie eblos raporti pri novaĵoj, interŝanĝi informojn, babili pri fakaj temoj kaj paroli pri planoj, ktp.

**Virtuala GEK (21-24.05.2021).** Kun granda bedaŭro GEA, PEA kaj IFEF pro la pandemia situacio decidis rezigni pri la planita ĉeesta kongreso en la limurboj Frankfurt (Oder) kaj Slubice. Prokrasti ĝin duan fojon pro pluraj kaŭzoj ne eblas. Sekvante la ekzemplon de aliaj Esperanto-eventoj ili anstataŭos la ĉeestan kongreson per virtuala. La organizantoj jam kontaktis plurajn el la kontribuantoj kaj esperas oferti samkvalitan programon - eĉ se mankos la loka etoso, la neformala kunestado, la ekskursoj kaj la jarĉefkunvenoj. Ankaŭ la virtuala kongreso komenciĝos vendredon (21.05.) vespere kaj daŭros ĝis lundo (24.05.) tagmeze. La temo "najbaroj" restos valida. Teknike oni uzos la Zoom-konton de GEA.
(La kompletan programon vi trovas aldone al tiu-ĉi cirkulero.)

Nun do NE okazos **AGEI jarĉefkunveno**, ĝi estas prokrastita ĝis oktobro kaj **okazos ĉ. 30-31.10.2021**.
Pro la neeblo organizi nun kunvenojn pro la koronaviruso kaj pro la nuligo de la planita Germana Esperanto-Kongreso je Pentekosto 2021, en kies kadro ni laŭ tradicio organizas nian kunvenon, ankaŭ ni forŝovas nian laŭstatutan jarĉefkunvenon. GEA kunsidos ĉi-jare en 30. oktobro en Herzberg am Harz (aŭ en ĉirkaŭaĵo) kaj ankaŭ ni esperas je ĉeesta AGEI-jarkunveno (aldone ankaŭ kun virtuala partopreneblo).

**1. Retaj ofertoj:** Ni komencis novan agadjaron sed sen gravaj eventoj, ja la situacio pro la viruso ankoraŭ ne multe ŝanĝiĝis kaj nur tre limigite eblas havi personajn renkontiĝojn, organizi kursojn, seminariojn, ktp. pro la multaj reguloj, ordonoj.

Tamen, ĝojigas nin la apero de pluraj interretaj kontaktebloj, ofertoj de Esperanto-kluboj, asocioj aŭ nur privatuloj, por kiuj gravas la kunagado eĉ se virtuale. Okazas prelegoj, prezentadoj, ludvesperoj, babilrondoj, komuna kantado, manlaborado, ktp. Oni povas lerni ankaŭ per tiuj retkunvenoj, ekzercadi paroladon, uzi la lingvon por internacia komunikado. Estas gratulinde ankaŭ la iniciato de Dr. Rudolf Fischer, kiu verkis tre detalan, bone ellaboritan retkurson „Esperanto en dialogo" http://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs/ kaj anoncis virtualan kurson laŭ tiu materialo. Ĝi allogis sufiĉe multajn kursanojn, kiuj sukcese lernas sub gvido de la aŭtoro.

Se vi mem gvidas iun ajn Esperanto-kurson, bv. registri ĝin ĉe la tiucela komuna internacia platformo de edukado.net.

**2. Membraro:** Ni dankas al ĉiuj membroj, kiuj daŭre subtenas la Asocion de Germanaj Esperanto-Instruistoj, restis fidelaj, pagis sian jarkotizon kaj tiel ebligas la kontinuan funkciadon de AGEI, realigadon de nunaj kaj estontaj planoj. Nia asocio restas inter la plej multnombraj landaj sekcioj de ILEI. Ni esperas, ke vi regule ricevadas la pedagogian revuon IPR kaj akiras novaĵojn, fakajn informojn ankaŭ per ĝi krom miaj foj-fojaj plusenditaj retmesaĝaj rapidnovaĵoj kaj krom tiu ĉi porokaza cirkulero.

**3. Klerigsesioj kaj kursofertoj en 2021:** Pro la pandemio **Esperanto-Centro Herzberg** devis forstreki kelkajn programojn de pluklerigado en la unua duonjaro, sed jen ĝiaj bonaj ofertoj por la resto de la jaro:

**3.1. aŭgusto inter 06-14 kaj 15-22, kiam okazos denove SEP** (Semajnoj de Esperanto-Perfektigo), t.e. intensaj lingvokursoj en pluraj niveloj (A1-A2, B1-B2, konversacia perfektiga kurso C1), do ĉiuj, de komencantoj ĝis perfektiĝemuloj trovos ion taŭgan. 100-hora lernado, komunaj programoj, ekskursoj kaj bona eblo ankaŭ je metodika observado, ricevo de konsiloj por instruemuloj. Aliĝilo ĉi tie (ĉe la koncerna dato), aŭ bv. uzi la aldone sendatan informilon/aliĝilon.

**3.2. oktobro 01-03: TORPEDO 16**: Pedagogiaj Tagoj (AGEI, GEA), prelegoj, prezentadoj, spertinterŝanĝo pri instruado de Esperanto**,** GEA-Studsesio, modulo pri gramatiko, lingvistiko, metodiko, didaktiko, instrukapabligo.

**3.3. decembro:** GEA-Studsesio, modulo pri Esperanto-literaturo, historio, movado, organizado, varbado.

**4. Kongreso de ILEI:** Bedaŭrinde ankaŭ ILEI devis ŝanĝi sian planon:
La 54-a ILEI-Kongreso en 2021 okazos verŝajne en hibrida (ĉeesta kaj virtuala) formo kun la ĉeftemo: Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj. Pro diversaj pandemiaj kaj organizaj malfacilaĵoj, la Estraro decidis transloki la ILEI-Kongreson 2021 de Skotlando al Benino, al ĝia ekonomia ĉefurbo, Kotonuo.
La Loka Kongresa Komitato (LKK) konsistas el prezidanto: Privas Tchikpe, membro kaj prizorganto de financoj: Mireille Grosjean, membro, organizanto de la evento kaj prizorganto de teknikaj flankoj: Jung Yuro (Unika). Por la kongreso kaj simpozio oni uzos retejojn, kiuj estas kreitaj subtenite de la entrepreno 'Eŭrodesign'. La retejoj helpas ĉefe por informado kaj organizado de la kongreso. Dume, la voĉdono-sistemo dum la komitat-kunsido estas subtenota de la entrepreno 'Civiencia'. Detaloj ankoraŭ aperos pri la evento kaj bv. viziti ankaŭ la hejmpaĝon de ILEI http://ilei.info por freŝaj novaĵoj.

**5. Manlibro:** En decembro 2020 aperis la 4a eldono de la **Manlibro pri instruado de Esperanto.** Ĝi estas reredaktita, ampleksigita kaj enhavas multajn novajn informojn pri la evoluo de lingvolernigaj novaĵoj de la lasta jardeko. Nun estas lanĉita nova sekcio en edukado.net, dediĉita nur por la Manlibro kaj koncernaj informoj, aldonaĵoj. En tiu paĝo vi povas legi ankaŭ pri la rilata, nun organizata somera evento. Por ke la aĉetintoj pli bone komprenu la libron, havu helpon trastudi, kompreni kaj bone utiligi ĝin, okazos **virtuala prelegserio kaj seminario** baze de la libro. La programo komenciĝos la 5an de junio kaj laŭplane okazos en sinsekvaj semajnoj dum la somero. Bonvolu viziti la paĝon por pliaj informoj: https://edukado.net/manlibro, kaj se vi interesiĝas, bv. anonci vin.

**6. Universitata studado:** Se iu volas solidan scion pri esperantologio kaj lingvopedagogio, tiam eluzu la eblecon ofertitan la lastan fojon en la pola universitato AMU. La Adam Mickiewicz Universitato en Poznano, unu el la plej signifaj polaj universitatoj, ofertas tri-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko kaj esperantologio kun specialiĝo en la tria jaro pri instruado de Esperanto.
La studado okazos plejparte virtuale. Partoprenontoj el la tuta mondo povas aliĝi ĝis la 1-a de aŭgusto 2021. Pli frua aliĝo bonvena. Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=849

Deziranate al vi agrablan printempon, bonan sanon, sukcesan agadon por Esperanto, atendante ankaŭ de vi informon pri Esperanto-instruado, kursoj, ktp., esperante renkonti vin en dimanĉo dum la virtuala AGEI-kunveno, kun multaj salutoj,

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto